

INFORMOJ je la 13a de majo 2017

Nous avons reçu :

- **12EME EDITION DU FESTIVAL DE LA VOIX, à CHATEAUROUX, du 19 au 21 Mai 2017**

Voir programme sur : <http://www.festivaldelavoix-chateauroux.fr> et *affiche jointe*.

- **JACQUES GAUME**

« Karaj geamikoj. Ni sendas al vi la Turanĝian Lukon. Bonan legadon. Amike. La grupo de Tours ». *Voir document joint*.

- **JOCELYNE MONNERET/ HORI JASUO**

Afisaĵo por la maja sumoo. « Admiru kaj partoprenu. Amike ». *Voir document joint*.

- **PETO AL KUNLABORO POR EKSPozICIO EN JOKOHAMO**

« Estimataj! Mi estas membro de NeProfitcela Organizo (NPO) Esperanto Jokohama. Hodiaŭ mi havas peton de vi. Ni havos ekspoziciojn de “Unuaj Lernolibroj de naciaj lingvoj por lernantoj de la unua klaso en baza lernejo, du fojojn en aŭtuno (septembro kaj novembro) ĉi-jara. Ankaŭ en la lasta jaro ni havis saman ekspozicion, kaj ni povis prezenti 28 lernolibrojn de 17 lingvoj en la mondo. La lingvoj estis: la ĉina en Ĉinio kaj la norma ĉina en Tajvano, la korea en Koreio, la mongola en Mongolio, la bengala en Barato (Hinda Unio), la taĝika en Taĝikio, la vjetnama en Vjetnamio, le germana en Germanio, la rumana en Rumanio, la rusa en Rusio, la ĉuvaŝa en Ĉuvaŝio/ Rusio, la ĉeĥa en Ĉeĥio, la slovakaj en Slovakio, la kroata en Kroatio, la hispana en Meksiko kaj Ĉilio, svahila en Konga DR, kaj la angla en Aŭstralio. Sed estas multaj aliaj lingvoj en la tuta mondo, kaj eĉ se la uzata lingvo estas sama, lernolibroj estas malsamaj kaj diversaj laŭ landoj kaj distriktoj politike kaj geografie. Do mi petas vian helpon! **Jen konkreta peto:** (1) Sendu al ni lernolibron de la gepatra lingvo, kiun viaj/vialandaj unuagradaj lernantoj de elementa/baza lernejo uzas. (2) Kun ĝi aldonu esperantigitan tradukon de kelkaj frazoj el la unuaj paĝoj, kaj ties prononcmankon (laŭeble en Esperantaj literoj). (3) Aldonu jenan informon pri la libro: nomo de la lando, lingvo, en kiu jaraĝo oni lernas per ĝi; ĉu la lernolibro estas donacita/ pruntita al la lernanto, aŭ lernanto devas aĉeti ĝin? (4) Kaj pri vi: nomo, adresoj poŝta kaj reta, kaj espereble via foto! Bonvolu sendi la lernolibron nepre registrite, ĉar lastjare tri libroj ne atingis nin. Antaŭdankon! Sendu la materialojn al: NPO Esperanto Jokohama, ĉe (s-ino) Doi Ĉieko: Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken 236-0017 Japanio Informon sendu al info@esperanto.yokohama. Se vi konsentas kunlabori kun ni, ni estus ĝojaj ricevi la informon al mi doicik@jcom.zaq.ne.jp aŭ al info@esperanto.yokohama. Kun antaŭdanko! Doi Ĉieko (s-ino) ».

- **LU WUNSCH-ROLSHOVEN**

« **En sabato, 22-a de aprilo, lanĉiĝis nova socia reto, Amikumu.** Ĝi estas uzebla per saĝtelefonoj kaj montras la cent plej proksimajn Esperanto-parolantojn, kiuj membras en ĝi. Jam pli ol tri mil aliĝintoj.

Ene de unu semajno aliĝis jam pli ol tri mil homoj el certe almenaŭ kvindek landoj. En kelkaj grandaj urboj membras jam pli ol deko da Esperanto-parolantoj. **Kontaktu la retan Esperantuĵon - aliĝu al Amikumu!**

Amikumu donas bonan eblecon por kontakti aliajn Esperanto-parolantojn - oni renkontiĝas unue en la reto kaj povas poste interkonsenti pri rendezuo eksterrete. Jen nova ebleco por trovi la enretajn Esperanto-parolantojn, kun kiuj ĝis nun ne tro facilis eksterreta kontakto. Por ke tio funkcii, necesas ke ankaŭ la homoj el la tradicia Esperanto-komunumo aliĝu al Amikumu kaj prezentu sin tie. Instrukcioj kiel fari troviĝas

sur <https://amikumu.com> kaj sube. **De jarlibro al "horlibro"**. En 1908 Hector Hodler lanĉis novan ideon - jarlibron, kiu faciligis trovi aliajn Esperanto-parolantojn. La nova ideo, kiun nun realigis Chuck Smith kaj Evildea kun sia teamo, 109 jarojn post Hodler, estas iusence nova versio de jarlibro. Sed tiun ĉi version ni povas nomi "horlibro" (se ne "minutolibro"), ĉar ĝi estas daŭre aktualigata. Nun vojaĝanto povas kontakti ne nur la lokulojn en ilia hejmo, sed pere de Amikumu ankaŭ aliajn vojaĝantojn, kiuj hazarde troviĝas samloke. Kaj la lokulo povas vidi, kiu vizitas lian aŭ ŝian urbon. **Artikoloj ĉe "Libera Folio" kaj "Ondo de Esperanto"**. Unuajn impresojn pri la nova oferto vi povas legi ĉe Libera Folio

<http://www.liberafolio.org/2017/04/23/amikumu-rapide-ekhavis-pli-ol-mil-novajn-uzantojn/> (kun unua mondmapo de Amikumu-anoj) kaj ĉe Ondo de Esperanto <http://sezonoj.ru/2017/04/amikumu-4/>. **Kaj ne**

forgesu aliĝi al Amikumu por ke la tuta Esperantujo estu videbla - al novaj lernantoj, al konversaciemuloj kaj al la tuta mondo. **Konkrete:** Iru per via saĝtelefono al la "vendejo" (fakte: distribuejo) de saĝtelefonaj aplikaĵoj ("apoj") kaj tie elŝutu la senkoston aplikaĵon. Multan ĝojon kun viaj Esperanto-kontaktoj ».

- **FLANDRA ESPERANTO-LIGO**

« **Post multaj jaroj finfine reaperis « Pasporta servo** ». Ĝi estas listo de personoj kiuj pretas gastigi, plej ofte senpage, esperantistojn en sia hejmo dum kelkaj tagoj, okaze de vojaĝo. La listo enhavas ĉ. mil adresojn. Ĝi enhavas ankaŭ mapojn, kiuj helpas prepari la vojaĝon. La libro enhavas 248 paĝojn kaj kosta 9 eŭrojn plus afranko. Vi povas mendi ĉe butiko@fel.esperanto.be aŭ tra la programo de la retbutiko www.retbutiko.net. Paul Peeraerts, volontulo pri eldona agado de FEL ».

- **ALEKS ANDRE**

« Karaj. **Un YouTubeur assez connu des jeunes, « Poisson Fécond », a réalisé une vidéo sur les langues, et mentionne l'espéranto à partir de 7:01, moitié de la vidéo** : https://www.youtube.com/watch?v=M2-gzuFg9_8&feature=youtu.be&t=421. L'analyse est pertinente et le discours favorable. Bravo à lui pour les – déjà – plus de 184000 vues ! Amike salutas vin. Aleks ANDRÉ - Komitatano de Espéranto-France - Membro de la Franca Esperanto-Instituto - Volontulo en la CO de UEA julion–aŭguston 2016 ».

- **AXEL ROUSSEAU**

« Saluton. **Les retombées de cette vidéo sur les cours internet sont très positives**. Nous avons enregistré plus de 50 nouveaux élèves en 3 jours (alors que nous avons une moyenne de 50 élèves dans l'ensemble du mois habituellement). Les inscriptions commencent seulement à se ralentir après 3 jours assez chargés. Et de nouveaux correcteurs se sont proposés pour venir nous aider à corriger ces élèves. Ces nouveaux élèves semblent très jeunes et n'ont pas forcément un très bon niveau. Ils sont souvent impatients et lisent le cours en diagonale. Il faudra voir dans quelques mois ce que ça aura donné en terme de résultat. **En tout cas, c'est un formidable coup de publicité pour l'espéranto et nos cours internet**. Amike. Axel ».

- **MARYVONNE HOUVIEZ / GOOGLE ALERTS**

« **Atentu, tre interesa ! Arkivo de 3ZZZ Radio en Esperanto** : <http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

- **DIDIER LOISON**

* **Article dans Femina (magazine Suisse)**. « "**L'espéranto m'a ouvert les portes du monde**". Grâce à cette langue universelle, Mireille a voyagé dans le monde entier et fait des rencontres extraordinaires. elle est aujourd'hui la grand-mère de cœur d'un jeune Népalais ».

* **Article dans la Dépêche du Midi**. « **Le langage universel sur le marché d'Engomer** ». *Voir document joint.*

- **CLAUDE NOURMONT**

Botanika staĝo 2017. « Karaj. La esperanta kulturcentro Kvinpetalo denove proponas al vi malkovron de la varia kaj bela naturo en kaj apud Bouresse, en Puatuo (je trideko da kilometroj sudoriente de Poitiers), Francio. La staĝo okazos ĉi-foje fine de la printempo, **de la 12a ĝis la 16a de junio**. Erare aperis aliaj datoj en la invito al Ĝenerala Kunveno de SYM. Ni invitas vin promeni tra naturo kaj Vikipedio sub gvido de Alain Favre, elstara fakulo pri fungoj. **Tiu staĝo havos du aspektojn : ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj : plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn. Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn – kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi**. Venu do bone ekipite – ŝue, vestaĵe, kaj se eble komputile. **Ne timu, se vi ne sentas vin spertulo: vi spertiĝos en tiu staĝo**. KVINPETALO Esperanto-Centro, <http://www.kvinpetalo.org/>. Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE. Retadreso: informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn) Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314..... **Bonvenon en Kvinpetalo!** Claude Nourmont ».

- **BERTO SUMAN**

Renkontoj por infanoj en julio / aŭgusto.

« **1) Infanoj, prelegoj, popoldancoj, joko, kantoj, familioj, pupteatro, Esperanto-kursoj. La somera programo en julio/aŭgusto en kastelo Gresillon**: <http://gresillon.org/somero>. **2) Fine de julio : IIK**, Infankongreseto dum Seula UK. Restas malmultaj lokoj. Vidu en bertosch.free.fr/iik2017/ et REF, Renkonto por E-istaj familioj, ĉijare en Serbujo. vidu en <https://familioj.wikispaces.com/REF+2017+Serbio>. ».

Gxis.

Renseignements complémentaires : 02 54 27 95 51 ou 06 78 90 92 17